



# PENSEO

*N-ro 150*  
*aprilo./2004*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 15-a jaro <http://www.elferno.net/penseo.htm>

## Patrino Amo

### Han Bing

Mi aŭdis la jenan rakonton, kies ĉefaj roluloj estas patrino kaj ŝia filo.

Ĉirkaŭ 40-jara, ŝi, tre kompententa, estris kompanion, por kiu laboris kelkaj miloj da dungitoj. Ĝuste pro tio, ŝia edzo ŝin forlasis, kaj lia argumentis, ke ŝi tro kompetentas en sia kariero. Tio okazis antaŭ dek jaroj. Dum la sekva jardeko, ŝi kaj administris sian kompanion kaj plenkreskigis sian filon. Ŝi ja multe ŝvitis kaj faligis multe da amaraj larmoj — sed neniu rimarkis ŝian larmadon. En ĉies okuloj, ŝi estis fridsanga virino. Eĉ ŝia filo konsideris ŝin tia.



Diplomiĝinte el supera mezlernejo, la filo ne povis eniri universitaton, ne pro tio, ke

li estis malpermesita lerni en universitato, sed pro tio, ke li mem neniel volis lerni plu. Nelonge post lia diplomiĝo el supera mezlernejo, li atingis la aĝon de dek ok jaroj.

Je lia naskiĝtago, ala patrino venigis sian filon kaj donis al li sumon da 1000 yuan, dirante, “Nun vi jam aĝas 18 jarojn kaj ne daŭrigas vian lernadon. La aĝo de 18 jaroj signifas plenkreskulecon. Plenkreskulo devas sin vivteni. Ĉi tiu monsumo servas kiel via kapitalo. Nun foriru kun la sumo. Revenu al mi ĝis kiam vi sufiĉe lukros monon, alie ni ne havos sangan rilaton inter ni.” Ĉimomente la

filo sentis, ke lia patrino estas senkora kaj fridsanga.

Nur post kelkaj tagoj, la monsumo elĉerpiĝis. Kion fari? Peti iom de la patrino! Kiam li reiris al la apartamento, kie ili loĝis antaŭe, li trovis, ke ĝi jam estas je alies dispono, kaj lia patrino malaperis senspuro. Li tuj falis en profunda malĝojo. Sento de forlasita izoliteco ekvolvis lin tiel firme, ke li apenaŭ elspiris.

Malsato pelis lin al serĉado de okupo. Fine li sukcesis gajni okupon por blanŝmiri murojn. Kiel laborpagon li povis lukri unu dolaron por unu blankŝmirita kvadrata metro. Li laboris la tutan tagon, kaj lia laborpago sufiĉis nur por tiutaga konsumado. Se mi plulaboros tiamaniere, li pensis, tio, kion mi gajnis, nur povos plenigi mian stomakon, kaj nenio restiĝos. Post longa cerbumado, li decidis dungi kelkajn laborantojn por fari ĉi tiun laboron. Li kalkulis, ke li donos al ili 0.8 dolaron por ĉiu kvadrata metro, kaj li mem retenos 0.2 dolaron kiel profiton. Kiel profitdona negoco!

Tiel li povis gajni ĝis cent dolarojn ĉiutage. Post duonmonato, lia profito atingis pli ol 1000 dolarojn. De tiam, surbaze de la antaŭa sukcesa sperto, li komencis serĉi aliajn ŝancojn por komercado.

En okupiteco li forgesis la patrinan kruelecon al li iom post iom, sed li ne inklinis ŝin pardoni.

Post unu jaro li fariĝis sukcesa komercisto, kiu havigis al si cent miloj da kapitalo. Kiam li droniĝis en memkontenteco, li ricevis el sia patrino leteron skribitan unu jaron antaŭe, kiu legiĝis:

Kara filo mia,

Kiam vi ricevis ĉi tiun leteron,  
mi jam forlasis la mondon.

Pardonu al mi, ke mi kruele  
forpelis vin el la hejmo  
lastafoje. Tiam mi jam estis  
trafita de nekurablebla malsano.  
Kvankam mi posedas dek  
milionoj da havaĵo, vi tamen  
ne havas nenian kapablon  
subteni vin. La vera kaŭzo, kial  
mi forpelis vin sensimpatie,  
kuŝas en tio, ke mi volas, ke vi  
ellernu kiel postvivi. Ĉar mi  
baldaŭ forlasos la homan  
mondon kaj karan vin, vi devos  
zorgi pri vi mem.

...

via,

panjo, kiu vin amas profunde  
tuj antaŭ la momento de morto

Kune kun ĉi tiu letero estis alia leĝa atestilo  
pri heredado de la tuta hejma havaĵo.

elĉinigis Luo Ren

## Poemetoj de Eta Princo

### Ŝanĝo

Pri via vivo, vi rakontadis  
pri la fora amo  
pri nia amo  
kiu ploras pro forpaso  
Sed kiam suno levigis la okulojn  
l' amo denove ekbrilis  
sur via vizaĝo  
en viaj okuloj

### ILUZIO

La amo, ne estis simpla  
ĝi foriradis kaj revenadis  
kunportante ĝojon kaj ploron

ĝis alridetadis al ni  
kaj brilis sur floso matene  
Ĝi provis nin kunligi  
La amo ne estis simpla  
ĝi flaradis la venton  
kaj ĉielen rigardis  
por aŭguri, kial ni ne volis kunvivi  
Allogis nin nur la noktoj  
kaj serenaj okuloj  
allogis nin, niaj en- kaj el-spiradoj  
niaj haroj plektitaj kun figroj  
kaj lipoj...  
Sed kiam okulojn ni malfermis  
Ĝi malaperis, senrevene.

### LUDO

Ni tiom ĝojis dum tuta nokto  
Ho Dio! kiom ni ĝojis  
Komence niaj korpoj kovris arĝenta  
ombro  
poste kisfloroj ekfloris ore  
fine la ĉielo heliĝis, tagiĝis  
Niaj ĉagrenoj  
la mateno kolektante pendiĝadis  
je arboj en ĝardeno  
Ĝuo kaj pasio kantis  
himnon del' koroj  
Ni ĝojis dum la tuta nokto  
poste nuboj kaj pluvo, malsekĝis tero  
Vi turniĝis, forlasis min, forpusis  
Mi staris ŝokita kaj pensanta:  
"Mi ne komprenas,  
kolorojn vi elverŝas,  
sed tamen malpuraj ili estas".

### PREĜO

Heligu miajn pensojn  
Ho! Potenco Eterna  
Plenigu mian koron  
per la amo ĉiela  
Enverŝu je mi  
Vian Forton kaj Saĝon  
Permesu al mi  
estis via infano

## HIRUNDO

Hirundoj diversdirekten forflugas  
 je momento ili senmovaj  
 pro kadro de l' aparato  
 eternigitajn.  
 Sekundo.  
 Nuboj nudaj traboritaj per suno  
 Minuto.  
 11 de septembro  
 homo, simila al hirundo flugas libere  
 Lamentoj.  
 Horo.  
 Ĉio, ĉie, ĉiaĵo.  
 VIVO=sekundo, minuto, horo  
 Pli da malĝojo  
 Pli da sufero  
 Pli da doloro.  
 Krom  
 amo, paco, sereno.  
 Oni kolektu bonaĵojn  
 simile al poŝtmarkoj plej valoraj  
 ĉar depest ili  
 etendiĝas malluma pejzaĝo de l' duboj  
 Nur hazarde  
 ni naskiĝis  
 Nur hazarde  
 ni amas, pacas, ĝojas  
 Nur hazarde  
 cirkonstancoj daŭras  
 Nur hazarde  
 la vento taŭzas  
 kadron de l' pejzaĝo  
 Nur hazarde  
 mi ne estas fortranĉita branĉo de l' arbo  
 seka kaj senutila  
 Nur hazarde  
 mi ne estis hirundo  
 de la 11-a de septembro  
 Nur hazarde  
 travivaĵoj  
 konstruas la vivon  
 esencon de l' hirundo.

## Aŭtuna Pluvo

Zhang Ailing

La pluvo, kiel malpeza neto teksita per arĝent-grizaj malseketaj araneaĵaj fadenoj, vualas la aŭtunan mondon. La ĉielo plumbe pezas, simila al la araneaĵ-kovrita plafono de la antikva loĝejo. La griz-blankaj nubpecoj amasiĝas sur la ĉielo kvazaŭ la blankaj kalkaĵoj defalintaj el la plafono. Ĉio troviĝas en eksterordinara prema sufokiteco sub la antikva kaj malnova tegmento. En la ĝardeno, malhele verdaj granatarboj, morusarboj kaj vinarbedoj, kiuj nur prezentas la pasintan prosperon de la somero, aspektante kiel konstru-restaĵoj de la antikva Romo, tremetas malkviete en la sibla pluvo nun, kvazaŭ



dronante en rememoro pri la pasinta gloro. La koloro de herboj jam fariĝis ĉagrene palflava kaj nenie vidiĝas iom da freŝaj floretoj. La delikataj narcisoj plantitaj strie ekster la loĝeja muro, kiuj klinas sian kapon kun larmeroj en la okuloj, veas pri sia malbona sorto, lamentante, ke ili suferas de tiel mucidplenan pluvtagon post nur kelkaj sunlumaj tagoj. Nur la osmantarbo ĉe la murangulo punktias siajn branĉojn per kelkaj orflavaj valoraj burĝonoj, kiuj singardeme kaŝiĝas sub la oleverdaj ovalaj folioj, kaj rivelas iome la esperon de ekapero de nova vivo.

L pluvo falas kviete, susurante. Kiel maljuna bonzo surhavanta koloran kasajon\* kun la kapo klinita kaj okuloj fermitaj, la oranĝkolora domo baptiĝas en la pluvo. La malsekaj ruĝaj brikoj, kiuj okulpike vidiĝas sangkoloraj, formas fortan kontraston kontraŭ la oleverdaj folioj de osmantarbo ĉe la muro. En la humida kaj mucida kotaĵo saltadas

